


# ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 541

DECEMBRO, 1950



# ANONCETOJ

*Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondhuponu por ĉiu duo da vortoj.*

**Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.**

**Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.**

**Dankon al D. de UEA**, S-roj F. Múgica (San Sebastian), J. Contreras Argüelles (Madrid) kaj D-ro R. Fiol Paredes (Sevilla) pro granda kaj sindona helpo dum vojaĝo en Hispanujo esprimas G. Vermandere, Anvers, Belgujo.

**Filatelistoj** kaj kolektantoj de ĉiuspecaj objektoj aliĝu al la sveda klubo "Nordia". Malalta jarkotizo. La klubo havas 985 membrojn en 57 landoj. Pluajn informojn kaj aliĝilon vi ricevos de la subskribinto aŭ rekte de "Nordia", Kungsgatan 22, Uddevalla, kontraŭ 1 int. rpk. Afranku filatele. Oscar Juhlin, Hamburgsund, Svedujo.

**Rickmansworth Esperanto-Klubo** okazigos poŝtkart-vesperon en Marto 1951. Salutoj atendataj el ĉiuj partoj de la mondo. Ĉiu ricevos respondon. Sendu al la sek: S. W. A. Tompkins, 1, Frankland Close, Croxley Green, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

**Knabinoj en Nov-Zelando** deziras korespondi tutmonde kun gejunuloj: Frankie Allsopp (17); Athalie George (17); Thelma Barnett (17); Colleen Adams (14); Lynette Millar (15). Adreso: Otahuhu College, Otahuhu S.E.7, Auckland, Nov-Zelando.

**Letervesperon** aranĝos popollerneja instruista grupo en januaro 1951. Sendu ĉiajn korespondadojn al s-ro Herman Noponen, Hämeenp. 31 B 18, Tampere, Finnlando. Certe respondos.

**50 geknaboj**, 10-14-jaraj, el popollernejo aranĝos bildkartvesperon en januaro 1951. Memoru nin! Sendu korespondadojn al s-ro Herman Noponen, Hämeenpuisto 31 B 18, Tampere, Finnlando. Respondo garantiata.

**Hispanujo**. Mi organizos venontan majon aŭtobusan turisman karavanon tra Hispanujo; mi deziras interrilati kun landaj gesamideanoj por diversaj helpaj informoj. Laboro pagota. Lovati Angelo, Via Lipari 8, Milano, Italujo.

**Nekatolikoj**, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Sekr. Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

**Oxford Esperanto-Societo** aranĝas letervesperon je januaro 17a 1951. Bonvole sendu salutojn al S-ro Woodward, 48, Wharton Road, Headington, Oxford aŭ S-ino Tandy, 17, Osberton Road, Oxford, Anglujo.

**Tridek-jara fraŭla** komunumoficisto deziras korespondi pri ĉiuj temoj tutmonden. S-ro Peter Angerer, Aflenz-Kurort, Stirio, Aŭstrujo.

**Pardonpeto**. En la sept. n-ro de *Esperanto* aperis korespondpeto sub adreso "A. E. Tiera y Mar" en Sabadell, Hispanujo. Nia studrondo intertempe transiris al alia grupo kaj la estroj de la nomita societo ne lasas al ni la alvenintan korespondadon. Ni petas la indulgon de samideanoj skribintaj. Nia nuna adreso estas: Esperanta Sekcio, "Kooperativa la Sabadellenca", str. General Mola 99, Sabadell, Hispanujo.

**UNIVERSALA KONGRESO**: Memoru, ke post 31 dec. la kotizo por la U.K. plialtiĝas de 30 ŝilingoj ĝis 35 ŝil. Profitu la favoran kotizon pagante jam nun sen prokrasto!

**Invito** al ĉiuj samideanoj. Sendu salutojn por poŝtkartkunveno, kiun okazigos la Manchester Esperanto-Societo la 31-an de Marto 1951. Ĉiu ricevos respondon. Sendu al S-ino Playfair, 12 Torbay Road, Urmston, Manchester, Anglujo.

**29-jara Finno** deziras korespondi kaj interŝanĝi Esperantadojn kun samideanoj nur en landoj ekster Eŭropo. Respondo certa. Skribu al S-ro Erkki Tuomanen, 4.kp. Lauritsala, Finnlando.

**Filatelistoj, il. pk. kolektantoj** skribu multnombre el ĉiuj landoj. Respondo garantiata. Vilhelmo Radnai, Jókai u. 14, Miskolc, Hungarujo.

**Internacia Komerca Servo**: Belga peranto: Konijnnerperken 109, Bosvoorde, Belgujo.

**La Kvakera Mesaĝo** pri la Krista lumo interna en la koroj de ĉiuj homoj ĉie ajn. Du libretoj haveblaj kontraŭ unu respondokuponon de G. B. Tordoff, 82 Pendennis Park, Bristol 4, Anglujo (Kvakera Esperantista Societo).

**Studentinoj** (15-16-jaraj knabinoj) deziras gekorespondantojn el ĉiuj landoj. Nepre respondos. Skribu al Klaso V Moderna, Sutherland House School, The Warrens, Cromer, Norfolk, Anglujo.

## KIO ESTAS VIA V.-K. ?

Kompilas S-ro A. S. Beuker, Bijenhofstr. 34, Leeuwarden, Nederlando.

Divenu la ĝustajn el la signifoj donitaj de la sekvantaj vortoj. Se vi ĝuste elektas ĉiujn via Vort-Kvocianto estas 100. Tamen deprenu 10 por ĉiu malselekto aŭ nescio.

- Spektaklo**: (a) ega bruo, (b) vidaĵo kiu altiras atenton, (c) neologismo por okulvitroj ?
- Fiktiva**: (a) krea, (b) malsincera, (c) nercala ?
- Beata**: (a) hipokrita, (b) feliĉega, (c) belega ?
- Akurata**: (a) preciza, (b) faranta ion je ĝusta tempo aŭ horo, (c) ĉasata ?
- Dieso**: (a) muzika signo, (b) speciala nutromaniero, (c) speco de floro ?
- Epitafo**: (a) tomba surskribo, (b) speco de poemo, (c) religia festo ?
- Foiro**: (a) placo de antikva Romo, (b) intermonta abismo, (c) komerca kunveno ?
- Floso**: (a) militŝiparo, (b) kunaĵo de arbarj trunkoj, (c) peceto aŭ tufeto ?
- Bemolo**: (a) besto, (b) muzika signo, (c) juvelŝtono ?
- Analoga**: (a) parte simila, (b) deloga, (c) ne konforma kun malnova epoko ?

(Respondoj sur p. 172)

43-a JARA

N-ro

Oficiala

Universala E

Fondinio :

Red

HANS

Helpr

MASON :

Ĉion por la r

ESPE

Palais Wilson

Traduko kaj re

estas permesat

citu la fonton.

celo oni sendu

aperas represio

al nia

Ĉion pri admin

kaj de la revu

abonado, rekl

sen

UNIVERSALA E

Heronsgate,

Herts.,

Jara abono :

(kun membre

12ŝ

Ĉefdelegitoj k

multa

Tarifo por

1 paĝo £5

1/4 paĝo 25 ŝil.

Anoncetoj pri

2 pencoj por

1 int. respondi

duo da

Legantoj en

# ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

43-a JARA Decembro 1950

N-ro 541 (12)

Oficiala organo de  
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro :  
HANS JAKOB

Helppredaktoro :  
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al  
ESPERANTO  
Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj  
estas permesataj, kondiĉe ke oni  
citu la fonton. Por bibliografia  
celo oni sendu periodaĵon en kiu  
aperas represo el ESPERANTO,  
al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA  
kaj de la revuo ESPERANTO,  
abonado, reklamoj, anoncetoj  
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Heronsgate, Rickmansworth  
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj  
(kun membreco kaj jarlibro  
12s. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en  
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 45 : ½ paĝo 50 ŝil.  
¼ paĝo 25 ŝil. : ¼ paĝo 12.5 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ  
1 int. respondkupono por ĉiu  
duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj

## LA 15-a DE DECEMBRO

Ree venas la tago, kara al ĉiu Esperantisto, la dekkvina de decembro, naskiĝtago de nia Majstro. Ĉie en la tuta mondo, kie troviĝas liaj disĉiploj, ili kunvenas je tiu ĉi dato kaj honoras lian memoron. Parolantoj provas pliproksimigi al la aŭdantaro tiun ĉi viron, veran civitanon de la mondo, kiu kreis la lingvon kiun ni amas, por kies disvastigo ni laboras, oferas kaj suferas. Prezentu al vi, kara leganto, la fenomenon eksterordinaran : homoj entuziasmiĝas por lingvo, ja eĉ *artefarita* lingvo ! Sed ĉu efektive estas la *lingvo* kiel tia, kiu movis la milojn kaj milojn da homoj, agadi por ĝia ĝeneraligo, toleri la mokojn kaj priridon de la "realistoj", de tiuj, kiuj staras firme sur la tero, ne kurantaj post utopiojn ?

Ne, ne estas nur la lingvo. Estas la spirito laŭ kiu la Esperantistoj starigis la movadon por internacia lingvo. Se temus *nur* pri lingvo, sed ne pri problemo tuthoma, interfratiga kaj humaneca, ne ekzistus plu nia afero. Aliaj provoj krei lingvon sintezan por internaciaj rilatoj ja aperis, eble pli proksimaj de la perfekteco, pli logikaj laŭ iuj detaloj, sed ili ne kapablis inspiri. Kia do estas unu el la originaj kaŭzoj de la sukceso de Esperanto, ni diru la *spirita* kialo ? Ĝi estas en la *sinlimigo* je io konkreta, firma kaj realigebla. Tiu ĉi sinlimigo, la sento pri mezuro en ĉio, troviĝas en la karaktero de D-ro Zamenhof, la idealisto realisma ! Lia scio pri la relativeco de ĉiu homa agado lin jam devigis nomi sin "iniciatinto" de la lingvo internacia, doninte la kadron de la lingvo, lasante al la disĉiploj plukonstrui sur la Fundamento starigita de li.

La sento pri mezuro kaj la sento pri formo estas la signoj de vere grandaj homoj. Ili ligiĝis kun alia karakterizaĵo kiun ni trovis ĉe D-ro Zamenhof : lia sincera, natura modesteco retrovebla en ĉio, kion li skribis. Ne lia persono, sed la ideo, kiun li defendis, estas la ĉefaĵo kaj tiu ĉi trajto lin distingis por ĉiam. La simpleco de lia sinteno persona paralelas kun la simpleco de la lingvo. Kreinto kaj kreaĵo kuniĝas en vera harmonio.

Zamenhof estis gvidanto pro la forto de sia karaktero, pro sia modesteco kaj modereco kaj la sento pri mezuro kaj celo. Pri tio ĉi ni konsciiĝu je la 15-a de decembro kaj . . . ni sekvu lin !

H.J.

L. Friis :

## Vojaĝu per Esperanto!

Sub tiu devizo mi invitis skandinavajn gesamideanojn partopreni miajn du karavanvojaĝojn al Sudeŭropo en la pasinta somero: (1) al Oberammergau—Innsbruck—Venezia—Verona. (2) al Romans—Nice—Svislando. Ambaŭ vojaĝoj daŭris po 16 tagoj.

Ni vojaĝis per aŭtobuso (32-persona) portanta sur la fronta fenestro la verdan stelon kaj afiŝon, kiu menciis la ĉisuprajn vojaĝliniojn kaj la simplan sed gravan aldonon "per Esperanto". Ĉie nia aŭtobuso estis facile konebla al lokaj gesamideanoj, kaj atentigis al aliaj pri nia afero. Modesta sed efika reklamo.

Mi ne intencas raporti pri ĉio vidinda kaj admirinda, sed nur informi, kiel nia lingvo kaj ĝia organizo estas unikaj rimedoj por turismo, kaj speciale atentigi, kiel ili altgrade helpis al ni.

La tuta preparo okazis nur per Esperanto. Lokaj delegitoj de U.E.A. kaj aliaj samideanoj plenumis miajn petojn pri hotelĉambroj, manĝoj kaj aliaj deziroj. Krome ili ĉiel helpis al ni, estante je nia plena dispono. Mi mencias, ekzemple, la nomon de S-ro Franceschi en Venezia, tre okupita negocisto, kiu donis al ni sian tutan semajnfino por nin gvidi, por klarigi kaj traduki. Simile en Verona, kie kelkaj junaj gesamideanoj malvaris sian tempon je nia profito. Dank' al ili kaj dank' al nia aŭtobuso kaj ĝia mikrofono ni rigardis kaj eksciis multe pri Verona dum relative mallonga tempo.

En Innsbruck ni restis kvar tagojn farante ekskursojn tra la ĉirkaŭa montaro. Ĉiutage donis al ni sian tempon de frua mateno ĝis malfrua nokto S-ro M. Stöckl kaj D-ro Blaase, docento ĉe la universitato. Dank' al ili kelkaj el ni ricevis eĉ permeson viziti monahinejon. La loka klubo aranĝis tirolan vesperon kun tirolaj dancoj kaj muziko.

Dum ambaŭ vojaĝoj ni ĉiuvespere kunvenis kun anoj de lokaj kluboj. Tiel ni havis bonegan kontakton kun lokaj loĝantoj, kion aliaj turistoj ne havas, sed forte deziras. Ordinare ni sidis internacie ĉe tabloj kaj la rezulto ĝenerale estas korespondado kaj daŭra amikeco inter nordanoj kaj sudeŭropanoj.

En Cannes troviĝas "Hotel-pensio Esperanto". Jam en februaro mi mendis tie ĉambrojn por mia dua karavano. Letere oni konfirmis tion al mi. Tamen unu monaton antaŭ nia ekiro la hotelo sciigis al mi, ke ĝi bedaŭrinde ne povas akcepti nin ĉar ĝi ludonis la ĉambrojn al aliaj. Granda katastrofo! ĉar je tiu tempo ĉiu hotellito jam estis mendita. Samideano

Bariteaud el Grasse vane serĉadis en tuta Cannes alian hotelon. Fine ŝi vojaĝis al Nice al S-ro Fiquet la loka delegito de U.E.A., kiu post longa klopodo fine sukcesis trovi hotelon por ni. Imagu nian situacion sen lia energio! Nur dank' al tiu delegito saviĝis la sukceso de nia karavanvojaĝo. La nuna posedanto de Hotelo Esperanto en Cannes ne estas Esperantisto. Samideano ne agus tiel senrespekte al skriba promeso kontraŭ samideano.

F-ino Comino en Nice gvidis nian ekskurson al Monte Carlo kaj al la itala landlimo. Ni transpasis ĝin, sed reirante unu el niaj karavaninoj estis kaptata de la itala polico ĉar ŝi ne kunportis sian pasporton. Nur post longa pledado de F-ino Comino ŝi liberiĝis.

En Romans (sude de Lyon) ni pasigis 4 tagojn. Dank' al la loka klubo kaj simpatia prezidanto, S-ro Asquery, Del. de U.E.A., ni ĝuis neforges-eblajn tagojn. Li aranĝis i.a. viziton al diversaj vinkeloj, kie ni havis okazon gustumi iliajn specialaĵojn, kaj aranĝis oficialajn akceptojn en la urbdomoj de St. Donat kaj Romans.

S-ro Zipfel, Del. en Strasbourg ne nur modele aranĝis ĉambrojn, manĝojn k.t.p. por ni, sed eĉ sciigis inspektoron de la landlima dogano pri nia alveno tiel, ke la trapaso okazis dum rekorda tempo. Admirinda helpo post laciga tago.

Tute kortuŝa estis la helpo de germanaj gesamideanoj. Multaj el ili dum pli ol 10 jaroj ne havis ian ajn kontakton kun eksterlandanoj. En Hannover kie ni trifoje tranoktis, S-ro Herbst je ĉiu alveno akceptis nin en la periferio, gvidis nin tra la urbo al la hotelo kaj ĉiufoje tre frue ellitiĝis por gvidi nin el la urbo. Tia helpemo estas vere eksterordinara. Niajn vesperojn en tiu urbo ni pasigis kun multaj gesamideanoj, kiuj ĝojigis nin per sia ĉeesto. Nur tre malmulte da germana valuto estis je nia dispono sed niaj germanaj amikoj ofereme nin helpis.

Al München ni venis kelkajn horojn tro malfrue, sed tamen lokaj gesamideanoj pacience nin atendis ĝis noktomezo por esti kun ni. S-roj Moravec kaj Simon grandskale helpis al ni la postan tagon kaj dank' al ili ni povis aranĝi pri biletoj al Oberammergau, kie Pastro Thalmaier multe helpis al ni. Mi estas certa, ke la Universala Kongreso en München en la venonta jaro estos plensukcesa, ĉar malgraŭ la ruinoj la urbo estas belega kaj la lokaj samideanoj energiaj kaj helpemaj.

Vojaĝu per nia lingvo kaj profitu nian internacian organizaĵon! Jen la plej simpla maniero apliki Esperanton en la praktiko.

D-rin

Pet  
kelka  
dank'  
Zame  
ĉiuj  
kelka  
perso  
mia i  
estos

Mia  
poste  
amiko  
pro t  
miaj  
ĝis nu

Jar  
impre  
En la  
parol  
liaj g  
en m  
per m  
rimar  
ĉiam  
sinter  
malfa  
mode  
ŝatis.

En  
sabat  
fratin  
invita  
ĉeesti  
kurac  
la ga  
Esper  
pliaga  
La M  
kaj m  
(medi  
reen  
plekt  
ludis  
ludis

Mi  
trav  
la H  
en I  
"Ve  
Pres

D-rino Wanda Zamenhof :

## Rememoroj

Petite de la Helpredaktoro, mi volonte skribas kelkajn memoraĵojn pri la Majstro. Lia vivo, dank' al multaj biografioj—precipe al *Vivo de Zamenhof* de E. Privat—estas ja bone konata al ĉiuj esperantistoj. Do mi intencas nur alĵeti kelkajn tute privatajn rememorojn el miaj personaj impresoj pri mia bopatro el la tempo de mia infaneco, kiam mi ne imagis ankoraŭ, ke mi estos ligita kun li per parencaj rilatoj.

Mia patro estis kolego de la Majstro en gimnazio, poste en universitato kaj ili estis ambaŭ grandaj amikoj. Niaj du familioj ofte vizitis unu la alian; pro tio mi rememoras D-ron Zamenhof jam de miaj junaj jaroj kaj tia li restis en mia memoro ĝis nun.

\* \* \*

Jam en mia infaneco lia persono profunde impresis min per sia granda kaj sincera modesteco. En la rondo de miaj parencoj kaj konatoj ĉiuj parolis pri li kiel pri geniulo. Mi ofte aŭdis pri liaj grandaj sukcesoj dum la internaciaj kongresoj en malproksimaj landoj, kie li estis superŝutata per multegaj grandaj honoroj; tamen neniam mi rimarkis en li eĉ postsignon de ia fiereco; kontraŭe ĉiam li mirigis kaj kaptis ĉiujn per sia modesta sinteno. Mi bone memoras, ke mia infana fantazio malfacile asociis la grandan faman homon kun la modesta doktoro, kiun mi bone konis kaj profunde ŝatis.

\* \* \*

En la familio Zamenhof ekzistis tradicio de sabataj vesperoj, kiam kunvenis ĉiuj fratoj kaj fratinoj kun liaj familianoj. Ankaŭ mi estis invitata kun miaj gepatroj. La Majstro ĉiam ĉeestis kvankam li estis tre laca post la tuttaga kuracista laboro, kaj lin atendis post la foriro de la gastoj ankoraŭ nokta laboro por lia kara Esperanto. Tiuj vesperoj estis tre bruemaj; la pliaĝaj babilis, ridis, la infanoj laŭte amuzis sin. La Majstro kutime sidis en ia angulo de la salono kaj mallaŭte interparolis pri diversaj gravaj aferoj (medicino, filozofio k.t.p.) aŭ promenadis tien kaj reen kun manoj laŭ sia kutima maniero kunplektitaj post la dorso. Iafoje, sed malofte, li ludis kartojn; tiu kartludo nomiĝis "okulo". Li ludis tre trankvile, neniam ekscitiĝis.

Mi bone rememoras unu el tiuj kunvenoj. Mi traveturis kun miaj gepatroj Dresdenon tuj post la Internacia Kongreso. Mi neniam poste estis en Dresdeno, kaj ĝi restis en mia memoro kiel "Verda" urbo. La impresoj estis grandega. Preskaŭ en ĉiuj magazenoj grandaj portretoj de la

Majstro, ĉie verdaj flagoj, verdaj steloj; en restoracioj, en kafejoj la kelneroj kun verdaj steletoj; tie kaj ree oni aŭdis konversaciojn pri la okazinta kongreso, pri la genia aŭtoro de Esperanto. Mi estis ravata kaj fiera, ke tiu fama homo estas mia bona konato kaj amiko, kaj kun granda malpacienco atendis la sabatan familian vesperon por vidi lin post tiuj triumfoj. Kia estis mia surprizo, kiam mi vidis lin kiel kutime sidantan modeste en angulo, babilantan mallaŭte kun sia frato Aleksandro, afable ridetantan. Pri la Kongreso li preskaŭ nenion rakontis. Ĉiujn detalojn ni aŭdis de mia bopatrino, kiu ŝatis rakonti, kaj faris tion tre interese.

\* \* \*

Kiel malgranda knabino mi havis ian okulmalŝancon kaj mia patro venigis min al la "bona doktoro". Mi estis forte timigita kiam mi estis en la atendejo inter multaj malsanuloj. Kun granda korprenemo mi eniris en la kabineton, sed kiam la Doktoro afable alparolis min, kiam mi rigardis en liajn tiel mildajn okulojn, mia timo malaperis; mi permesis esplori miajn okulojn kaj, kvankam la enverŝitaj gutoj estis tre dolorigaj, mi sidis tute trankvile kaj sentis min feliĉa, kiam la Majstro laŭdis min pro mia brava sinteno. Eble en tiu momento mi decidis fariĝi okulkuracisto same kiel li.

\* \* \*

Okazas ofte, ke homoj, kiuj laboras por la tuta homaro, estas en sia privata vivo malbonaj familianoj. La Majstro sciis kunigi la amon por la mondo kun profunda sento por sia familio. Li estis bona edzo, sentema patro, ŝatis treege siajn filon kaj filinojn. Kiam Adamo kaj Sofio estis infanoj kaj poste gimnazianoj, kaj Lidia ankoraŭ malgranda knabino, Sinjorino Zamenhof kutimis pasigi la someron en vilaĝo Miedreŝin proksime de Varsovio. La Majstro venis tien ĉiun dimanĉon kaj dediĉis la tutan tagon al sia familio por promeni kune en arbaro aŭ sidi en ĝardeno antaŭ la domo en kuŝseĝo, kun la tuta familio ĉirkaŭ li.

Mi rememoras la bongustan torton kun fragoj kaj freŝa kremo, hejman specialaĵon, per kiu la afabla sinjorino Zamenhof gastigis la multnombrian junularon, kuniĝintan en ŝia domo. La Majstro ofte sidis inter ni kaj ŝatis aŭskulti niajn malgrandajn zorgojn. Kun serioza mieno li konsultadis nin kaj diskutis kun ni. Li treege amis la junularon ĉar lia animo ĉiam restis juna.

## TRA LA MONDO ESPERANTISTA

**Argentino**

La grupo *Agrupacio Esenco Cerbo Ordo* (eldonanto de *Boletín E.C.O.*) multe klopodas en Argentino pri disvastigo de Esperanto inter la junularo, kaj tiucele organizas festojn multe vizitatajn. En septembro pasinta la grupo organizis viziton al *Colonia de Cooperarios* (Koopera vilaĝo) proksime de la argentina ĉefurbo. La vizitantoj povis vidi ĉiujn instalaĵojn kaj admiri la atingojn de homoj kun granda volo, sindona spirito kaj koopera sento. Ili vizitis diversajn konstruaĵojn, teksejojn, infanlernejojn, bubludejon, magazenon, trinkejon, sportludejon k.s. La domojn en tiu kooperativa vilaĝo karakterizas kalifornia stilo. Post kelkaj sportludoj inter la junularo oni aranĝis artan programon en kiu partoprenis diversaj talentaj artistoj. Dum tiu festo oni havis la okazon atentigi pri la komuneco inter Esperantismo kaj Kooperativismo—paralelaj ideoj, unu sur lingva kampo la alia sur tereno ekonomia.

**Britujo**

En la jarkunveno de la partio *Common Wealth* la delegitoj aprobis dokumenton laŭ kiu inter la agaro de tiu partio troviĝas: "... la propagando por la enkonduko de la mondlingvo Esperanto en ĉiujn lernejojn kie oni ankoraŭ ne instruas ĝin." La partio krome eldonis en Esperanto "Manifesto por Tutmonda Kunvoko de ĉiuj, kiuj kredas je Libero, Egalo, Frateco por ĉiuj Homoj" (havebla ĉe L.E.F.T., 460 Wilbrahan Road, Manchester 21, Anglujo). Salutojn al: *Common Wealth*, 12 High St., Hampstead, London, N.W.3.

**Finnlando**

Antaŭ nelonge la finna Ministerio por Ekstero asignis sumon (ĉ. 75.000 francajn frankojn) por la akto de la verko de la fama franca verkisto Georges Duhamel *Norda Kanto* tradukita de Roland Dupuis. La verko traktas pri Finnlando kaj estas belega eldonaĵo. La celo de la subvencio estas, disdoni al la Esperantistaro ekzemplerojn de tiu verko. Tial ke la disdonata verko estas limigita je kvanto, ĝin ricevos tiuj kiuj faros rekompencan servon. La *Eldono Vilho Setälä* preparas tutmondan geografian legolibron tute en Esperanto, kaj la libro *Norda Kanto* estos donata al tiuj, kiuj donos al tiu eldonejo sialandajn faktajn informojn utilajn por la kompilo de tiu nova verko. Interesatoj sin turnu al: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki, Finnlando.

**Germanujo**

Estus utile por la enlanda propagando de Esperanto, se multaj gesamideanoj skribus al: Deutsches Bundesbahn, Offenbach/Main, petante

Esperantlingvan informon pri vojaĝado en Germanujo prepare por la venontjara U.K. en München. Ne menciui ĉi tiun anoncon!

**Japanujo**

La 37-a Tutjapana Kongreso de Esperanto okazis 22-23 de julio 1950 en Yokohama. Partoprenis ĝin 137 gesamideanoj. Detala raporto ankoraŭ ne atingis nin.

**Norvegujo**

La norvegaj Esperantistoj denove ĉi tiun someron aranĝis Esperantistan ferion en Lofthus en la belega Hardanger. Al tiu ferio venis 30 gesamideanoj el 4 landoj. La programo estis, kiel kutime, tre diversa kaj la partoprenantoj tre bone fartis malgraŭ tre variema vetero kun multe da pluvo. Dum la vesperoj oni diskutis, kaj aŭskultis prelegojn, ludis societajn ludojn, aranĝis vivan gazeton kaj multe kantis kaj muzikis. La aranĝintoj ricevis multajn laŭdojn precipe la prezidanto S-ro Johan Matland.

Norvega Esperantista Ligo havas specialan gazetaran servon, kiu sendas ĉiun duan semajnon malgrandajn informojn pri Esperanto al ĉiuj norvegaj gazetoj. Tre multaj gazetoj presigas tiujn informojn. Pri la U.K. en Parizo kaj pri personaj spertoj de kongresanoj aperis multaj raporto en lokaj gazetoj.

N.E.L. por la vintra kursesozono dungis tri eksterlandajn instruistojn: S-inon M. Haudebine (por Oslo, Drammen kaj Trondheim); D-ron A. Mildwurf (por Haugesund kaj okcidenta Norvegujo) kaj S-ron Tiberiu Morariu (por Harvik kaj Tromsø). La plej granda leterlernejo de Norvegujo, Folkets Brevskole (popola leterlernejo), kiu estas subvenciata de la ŝtato kaj de la plej grandaj laboristaj organizaĵoj, enkondukis Esperanton.

**Sovetunio**

En sia numero 294 *East Europe and Soviet Russia*, samnoma organizaĵo en Londono publikigis la jenan informon:

"Respondoj de Stalin: Je aŭg. 1 la dekkvara eldono de *Bolŝevik* publikigis respondojn al demandoj senditaj al li rilate al liaj antaŭnelongaj artikoloj pri la lingvistiko. En unu respondo li anoncis ke en la estonteco unuopa internacia lingvo 'nek la germana, nek la rusa, nek la angla' estos kreata, enhavanta la plej bonajn elementojn de ĉiuj naciaj kaj regionaj lingvoj. Ĉi tio vigligis la sovetajn Esperantistojn, ĝis nun rigardatajn kiel 'kosmopolitaj-burĝaj-idealismaj-deviuloj'. Je aŭg. 1 la Ministerio por Alteduko anoncis ke en la nova universitata temaro la instruado de Esperanto 'estos reorganizata konforme al la antaŭnelongaj deklaroj de Stalin pri la lingvistiko'."

En redaktora noto oni diras ke "... Ĝi (Esperanto) koniĝis en Pollando kaj Rusujo, sed ne disvastiĝis eksterlande." !!! La adreso de la

konco  
Sovie  
Angh  
(Rir  
gi fak  
Espera  
Espera  
Jus  
aliigas  
plu ek  
subpre  
aliaj li  
kaj po  
nacia  
k.t.p.,

La  
Instru  
kursor  
Porim  
venon  
propo  
adopt

Skil  
24-a  
skiren  
Brides  
petu  
Chaba

La  
Kunve  
helpan  
(30 de  
valoror  
organiz  
kurson

Tion  
la kon  
esperan  
promes  
kaj D-r

Malk  
antaŭv  
komun  
de kor  
En plu  
ankaŭ.

Unu  
delegit  
ĉiuj su  
diskuti  
monda  
al: A  
Wilson

koncerna organizaĵo estas: East Europe and Soviet Russia, 16 Chester Row, London, S.W.5, Anglujo.

(Rim. de red.: Estas prudente ne legi en tiu afero pli ol ĝi fakte diras. Rimarku, ke ne temas pri "instruado de Esperanto" sed pri "reorganizado de la instruado de Esperanto". Prefere oni atendu elvolviĝojn de la afero).

Jus ricevita informo pri la ĉisupra: La kunteksto tute aliĝas la sencon. ". . . kiam la monda imperialismo ne plu ekzistos . . . tiam . . . oni ne eĉ povos paroli pri la subpremo kaj malaperigo de unuj lingvoj kaj pri venko de aliaj lingvoj. Tiam . . . ekzistos centoj da lingvoj . . . kaj poste tiuj lingvoj konformiĝos en unu komuna internacia lingvo, kiu kompreneble estos nek la germana, k.t.p., k.t.p."

### Urugvajo

La Nacia Konsilantaro de Popola kaj Normala Instruado (ŝtata) decidis enkonduki fakultativan kurson de Esperanto inter la lernobjektoj de la Porinstruista Instituto en Montevideo jam de la venonta jaro. Iniciatis Prof. Fernández M., proponis Direktorino Orticochea kaj unuanime adoptis la koncerna instanco.

### Esperantista ski-renkontiĝo

Skikurantoj estas informataj, ke okazos de la 24-a de dec. ĝis la 2-a de jan. Esperantista skirenkontiĝo en Meribel les Allues, Savojo, apud Brides les Bains (Franca Alparo). Interesatoj petu informojn de: S-ro E. Bidoit, 38 Rue Chabaud, Reims, (Marne), Francujo.

### Mondpopola Kunveno

La prepara komitato de la Mondpopola Kunveno en Genève decidis uzi Esperanton kiel helpan lingvon dum la venonta kunsida periodo (30 dec. 1950—4 jan. 1951). Por plie pruvi la valoron de la nomita lingvo la lokaj Esperantistoj organizos dum la kunveno resuman Esperanto-kurson sub gvidado de Andreo Cseh.

Tion celante kaj por apogi la ĉisupran projekton, la komitato opinias, ke forta partopreno de esperantistaj samideanoj estos nepre necesa. Jam promesis ĉeesti S-ino Isbrucker, S-ro Hans Jakob kaj D-ro Edmond Privat.

Malkaraj aranĝoj por loĝado kaj nutrado estas antaŭvidataj. Semajna restado en Genève en komuna dormejo kun kompleta pensio inkluzive de konferenca takso, kostos proks. 72 sv. fr. En pluraj landoj vojaĝgrupoj estas organizotaj ankaŭ je malaltaj prezoj.

Unue okazos malferma kunsido de la elektitaj delegitoj kaj poste konsiliĝa kunveno, libera por ĉiuj subtenantoj de la monda movado, kie estos diskutataj ĉiuj demandoj celantaj starigon de monda registaro. Por mendoj kaj informoj skribu al: Assemblée Mondiale des Peuples, Palais Wilson, Genève, Svislando.

A. Bourguignon :

## Dramo de la Koro en la Foiro

La vendejo estas plena de multenombraj bestoj . . . .

Kampanoj kaj bestkomercistoj diskutas laŭte kaj longe . . . . Tamen fine la kontrakto estas akceptita. Ĝi estas solene konfirmata per forta manpremo. La nova posedanto de la bestoj markas ilin, ĉu per ĉizaĵoj tra la felo, ĉu per iomete da ruĝa farbo sur la frunto.

Mi vidas ĉi tiun scenon ĉiumerkrede kaj mi interesigas ĉiam pri multaj vivaj kaj kortuŝaj detaloj.

Kiel kutime mi hodiaŭ vizitis la foiron serĉante per la rigardo la kaprinojn, kiuj certe estas la plej amindaj bestoj. Nenian vidante, mi estis forironta, kiam mi subite vidis avinon kaj jam ruĝmarkitan kaprineton ameme kroĉantajn sin unu al la alia.

Sendube la maljunulino, devigita de monbezono, ĵus vendis sian bonan amikinojn kaj nun ŝi plene komprenas la abomencon de sia krimo! Tial per abundo de karesoj ŝi petas pardonon pro sia perfido; sed vane . . . . la besto estas vendita, kaj post kelkaj minutoj okazos ŝira disiĝo!

Kaj kia estos la sorto de *Biŝeto*? Tion la malfeliĉa avino scias tre bone . . . . ho ve!

Tiel mi surprizis ĉi tiun intiman kaj kruelan dramon de la koro. Tre diskrete mi partoprenis kun la kompatindaj estuloj, kiuj estis kunigitaj per tiom fortaj ligiloj. Kiel la avino, ankaŭ mi funebras kaj sekrete mi . . . . ploris!

### Malgranda kompost-maŝino

En *Esperanto* julio-aŭgusto 1949, p. 97 troviĝas artikolo pri Vari-Typer-maŝino. La verkinto de tiu artikolo, S-ro Howard Hulme, plendis, ke la fabrikistoj ne disponigas Esperantajn literojn por tiu mirinda aparato. S-ro A. Lienhardt (D. de U.E.A. en Mulhouse, Francujo) kontaktis la nomitan firmon kaj estas informita, ke Esperantaj literoj nun estas haveblaj. La firmo eldonis senpagan broŝuron *Type faces in foreign languages* (litertipoj en fremdaj lingvoj) kiu fakte mencias du Esperanto-literplatojn krom tiuj de 53 aliaj lingvoj.

La adreso de la firmo estas: Coxhead Corporation, 333 Ave. of the Americas, New York 14, N.Y., Usono. Filio estas: Vari-Typer, 90 rue de Richelieu, Paris II, Francujo.

Rimarkinde estas, ke la senpage havebla libreto en Esperanto, *Historio de K.L.M.* estis kompostata per tiu moderna kompost-maŝino, sed ŝajne ne per uzo de la specialaj Esperantaj literplatoj.

Olga Zamenhof-Nietupska :

# MALARIO

(tradukis D-ro Julian Zamenhof)

En la mikroskopo regas malvarma violema bluo. Krepuskas en la laboratorio, kaj tra la malfermita pordo flagras brikruga korto.

Parazitoj de malario ŝajnas bluaj ringoj kun rubenoj. Ili fine troviĝas sub la lenso.

Akvo gute frapas en malplenan cisternon.

Tintas laboratoriaj vitraĵoj amase kunjetitaj.

Negra laboratorilaboranto singarde manumas la boteletojn (kiel nigraj ŝajnas liaj manoj sur la fono de la blanka tablo kaj mia laborvesto!).

Martini havas la vizaĝon de Litova kamparano kaj kiam li rigardas en la mikroskopon liaj suprenkurbiĝintaj okulharoj subtile tremetas.

. . . . *Spirocheta* maldik-spirale troviĝas perfideme sur la blua fundo . . . .

"Rigardu, Martini, *spirocheta*!" Martini klinas rondan lansimilan kapon al la mikroskopo.

Iuj pretendas, ke laodoro de Martini estas simpla inventaĵo. Tiu "inventajo" tamen miksiĝas kun la akraodoro de cedra oleo, naŭzas, kaj longe persistas eĉ longe post la foriro el la laboratorio. En Varsovio cedran oleon oni kunigas kun Kolonja akvo por krei *Soir de Paris* (kiu odorigas la flavan kolon de kuracistino Marinjo)! Marinjo havas larĝan negran vizaĝon kaj kiam ŝi rigardas en la mikroskopon, ŝiaj helaj pudritaj okulharoj vibradas.

Januara sunvarmo resaltas de la brika korto. La aero tremas supre de karoba arbo kaj stranga, nevidebla birdo kantas en la alto. Alie silentas.

"Multe da malario hodiaŭ. Ĉio pozitiva," diras Martini.

Negra flegistino venigas negron en kacia laborvesto, kaj kun infano surbrake. Poste eniras knabo zonita ĉirkaŭkokse per ĉifono. Li tenas grandan faldeblan ombrelon. La flegistino portas blankan veston kaj blankan kapotukon mal-suprenigitan ĝis la brovoj. Ŝi scias, ke Martini amas ŝin. Ŝi turmentas lin provokridete, nudigante la dentkarnon kaj rozkoloran langon kaj suprenturnante la okulglobojn. Ĉe la nazo ŝi havas steleton el kristaloj kaj sur la brakoj multajn vitroperlojn.

Martini ŝvitas.

La infano sub la bluruĝa ŝtofo ronke spiras. La flegistino malkovras ĝin delikate. Ĝi estas nuda, bruna; ĝiaj kruroj kaj brakoj estas dikaj, kiel de hundido. Ĝi estas ronda kiel lakte trinkinta katido.

La patro rigardas la flegistinon per grandaj okuloj. Liaj dikaj lipoj estas iom malfermitaj.

Oni elprenas sangan el fingro de la malgrandulo. Li ekploraĉas. Baldaŭ li sidas en akve plenigita kuvo. La flegistino babilas, ridas, ŝprucigas per akvo la etulon, kiu kriegas. Gutoj perlas sur la laneca kapo kaj brilas kiel ĉielarko.

"Ĝi ege febras!" diras la laboristo. Li estas vestita per longa pantalone, stria ĉemizo kaj trikoto. La negro zorge ĉirkaŭvolvas sian idon, forprenas ĝin kaj sidiĝas en la korto sur la tero ĉe la muro.

Mia testvitro ĵetfrapiĝas alterne kun tiu de Martini. Lia tintas alisone ol mia. En la blua gaja mikroskopa areno mi neatende trovas malbonaŭgurajn etajn ŝpinilformojn... Malgraŭ ĉio *tripanosoma*!

Sendita hodiaŭ matene sango-specimeno el *ce-ce* bataldistrikto. Nomo de la malsanulo: *Galipoli*. Izola Greko dum tri jaroj estras la militon kontraŭ la *ce-ce* muŝo en la Unua Distrikto. Ĝangalo, negroj kaj *ce-ce* muŝo . . . .

Multfoje li ricevis inviton transiĝi al la civilizo sed ĉiufoje rifuzas ŝultramove.

Terure ektondras tamburoj. De loko al loko tamtamoj flugigas la informon, ke la bona *bwana* (sinjoro) ekmalsaniĝis: malsana . . . malsana . . . malsana . . . tondras la tamburoj unu post alia. La informo transiris 900km. en unu nokto kaj antaŭ mateno la kuracejo havas la informon.

"*Bwana Kubwa* (Estimata sinjoro) verŝajne mortos", Martini estas zorgoplena. Mortos . . . La blankuloj lin forgesos, sed la negroj memoros lin. Li legendiĝos. Oni rakontos pri la bona blanka dio, kiu timigadis leopardojn, sed mem falis sub la malgranda bruna muŝo . . . .

Blanka flegistino enkuras la laboratorion. Helaj haroj ĉirkaŭ la kapo brilas ore sub la suno. Ŝi estas malpeza kiel ŝaŭmo.

"Martini! Kial vi informis D-ron Gokale, ke D-ro Jutson ne ĉeestas en la hospitalo? Li ja estas en sia ĉambro!"

Martini kunigas iomete la ŝultrojn. "Mi ne povis lin trovi . . . ." kaj embarasiĝe gratas per kraĵono la harapartigon pene razitan.

"Diablo!" klara alta voĉo sonoras kvazaŭ laboratoriaj boteletoj en laboratorilaboristaj manoj. Kun senpotenca kolero ŝi kunpremas la pugnojn kaj elflugas el la laborejo.



## INDEKSO

	paĝo
Archdeacon, Ernest : P. Petit .. .. .	38
Arttrezoro de Lascaux : M. Otiel .. .. .	58
Blaise, Paul : Hans Jakob .. .. .	38
Blaise, Paul, Memoriga Kaso .. .. .	160
Botelo da parfumo : D. R. Collins .. .. .	154
Brita movado, La : I. Lapenna .. .. .	96
Ceremonio de popolrajto .. .. .	73
Ĉarto de nova tero (Homoj de la arboj) : Mason Stuttard .. .. .	27
Ĉefartikoloj .. .. .	1, 17, 33, 49, 61, 77, 93, 109, 125, 137, 161
Ĉina sprito .. .. .	98
Ĉirkaŭ nova libro : G. Rust .. .. .	9
Ĉu U.E.A. naciĝis ? : Hans Jakob .. .. .	40
Datreveno .. .. .	76, 123
Dekalogo por fremdaj Esperantistoj : T. Sekelj .. .. .	167
Delegitoj, Alvoko al .. .. .	76
Dramo de la koro : A. Bourguignon .. .. .	165
Edziĝoj .. .. .	7, 32, 76, 105, 123, 158
Egipta samideano en Skandinavio .. .. .	106
Eldiraĵoj de Fontanelle .. .. .	106
Esperantismaj Problemoj IX : Hans Jakob .. .. .	19
Fianĉiĝoj .. .. .	7, 76, 123
Filmigo de dramo : R. Rossetti .. .. .	89
Fluoj en nia literaturo : Mason Stuttard .. .. .	146
Franca vivnivelo : L. Laurat .. .. .	102
Gazetservo dum la 35-a U.K. .. .. .	127
Giannella : F. S. Almado .. .. .	169
Gvidlinioj por geamantoj : F. Hayotte .. .. .	170
Ĝardeno de la amaŭtoj : I. de Castro/J. da Silva .. .. .	9
Higieno-Malhigieno ? : M. Otiel .. .. .	73
Homoj kontraŭ la dezerto : Ritchie Calder/E. D. Durrant .. .. .	35, 55, 64, 80, 100
Idealismo kaj praktiko : E. Malmgren .. .. .	1
Internacia Koresponda Servo .. .. .	170
Jubileo Esperantista .. .. .	76, 123
Jubilea libro de la svisa poŝto : Hans Jakob .. .. .	71
Jugoslavujo : I. Lapenna .. .. .	20
Junulgasteja movado, Brita : M. Otiel .. .. .	132
Kio estas via V.-K. ? : A. S. Beuker .. .. .	72, 82, 103, 133, 151, 172
Klimat-ŝanĝiĝo .. .. .	47
Kongresoj kaj Konferencoj :	
35-a U.K. .. .. .	5, 17, 28, 41, 51, 63, 78, 85, 110-122, 127, 142
36-a U.K. .. .. .	125, 156
Angers .. .. .	129
Brazila .. .. .	34
Brita .. .. .	50, 104
ĈSR .. .. .	66
Germana .. .. .	3
I.F.E.F. .. .. .	50
Islanda .. .. .	50
Kristana .. .. .	50

	paĝo
L.E.E.N. . . . .	84
Nederlanda . . . . .	125
Novzelanda . . . . .	123
Salzburg . . . . .	50
S.E.A.T. . . . .	6
Skota . . . . .	38
Svisa . . . . .	66
T.J.O. . . . .	2, 134
Konkursoj :	
Enigmaj : P. H. Mooy . . . . .	6, 32, 39, 59, 74, 91, 107, 123, 158, 171
Internaciaj . . . . .	6, 20, 22, 39, 54, 71, 89, 106, 123, 136, 160
Por artistoj . . . . .	72
Konsumkoopero en Svedlando : T. Odhe . . . . .	140
Kvin semajnojn en Islando : I. Lapenna . . . . .	78
Libroj, Ankoraŭ pri Esperantaj : Esperanto Publishing Co. . . . .	57
Libroj en kaj ekster Esperanto : K. Wilgenhof . . . . .	24
Lingvaj punktoj : M. C. Butler . . . . .	47
Lumanta aŭto . . . . .	47
Majusklado, Pri : Mason Stuttard . . . . .	29
Malario : O. Zamenhof-Nietupska/Julian Zamenhof . . . . .	166
Malgranda kompostmaŝino . . . . .	165
Mateniĝo : J. Semmelink . . . . .	79
Morris, S-ino Dave H. . . . .	134
Mortintoj, Niaj . . . . .	7, 32, 38, 76, 90, 105, 123, 134, 158
München . . . . .	156
Muzeo en München . . . . .	46
Muzeo, Internacia Esperanto— . . . . .	26
Muzeo pri ledo . . . . .	47
Nacia lingvo hinda : G. Agricola . . . . .	70
Naskiĝoj . . . . .	7, 32, 38, 76, 123, 158
Neologismoj, Pri . . . . .	12, 23
Nia forto kaj nia malforto : I. Lapenna . . . . .	45
“Nova Espero” : C. R. Smith . . . . .	14
Novjaraj pripensoj : Hans Jakob . . . . .	2
Observadoj de D-ro Ĉu, La : J. Papini/M. Simondetti . . . . .	11
Okcidentano rigardas la Orienton : A. C. Blatt . . . . .	130
Parizo ! Ha : G. Avril . . . . .	94
Parizaj apartaĵoj : G. Agricola . . . . .	62
Pensoj pri libro : J. Régulo Pérez . . . . .	10
Pentraĵoj 20.000-jaraĝaj : M. Otiel . . . . .	58
Poezio . . . . .	12, 15, 68, 95, 141, 151, 153
Prelegvojaĝo en Britujo : W. A. Gething . . . . .	98
“Problemoj” : E. Malmgren . . . . .	99
Radio . . . . .	7, 26, 35, 59, 74, 91, 107, 135, 159, 171
Raportoj el :	
Argentino . . . . .	104, 164
Aŭstralio . . . . .	34, 50, 104, 138
Aŭstrujo . . . . .	3, 18, 50
Brazilo . . . . .	34, 83, 138
Britujo . . . . .	3, 18, 34, 50, 88, 104, 138, 164
Ĉeĥoslovakujo . . . . .	7, 18, 52, 104, 138
Danlando . . . . .	67, 123

	paĝo
Finnlando .. .. .	67, 164
Francujo .. .. .	35, 52, 66, 83
Germanujo .. .. .	3, 19, 83, 164
Hispanujo .. .. .	.. 3, 104
Hungarujo .. .. .	3, 18, 83
Islando .. .. .	50, 52, 63, 78, 139
Italujo .. .. .	35, 38, 66, 104, 133
Izraelo .. .. .	.. 18
Japanujo .. .. .	104, 139, 164
Jugoslavujo .. .. .	.. 104
Koreo .. .. .	66, 130
Maroko .. .. .	.. 84
Nederlando .. .. .	3, 18, 35, 67, 84, 104, 134
Norvegujo .. .. .	50, 104, 164
Novzelando .. .. .	.. 66
Portugalujo .. .. .	.. 139
Sovetunio .. .. .	.. 164
Sudafriko .. .. .	.. 84
Svislando .. .. .	.. 66, 84
Urugvajo .. .. .	3, 67, 165
Usono .. .. .	3, 19, 31
Raportoj pri :	
Astronomio .. .. .	35
Ekspozicio pri la infano .. .. .	67
Esperanto en intelektaj interesanĝoj .. .. .	116
Esperanto en lernejoj .. .. .	114
Esperanto en scienco kaj tekniko .. .. .	115
Esperanto en trafiko kaj komerco .. .. .	117
Fremdul-trafiko .. .. .	2
Germana Muzeo .. .. .	46
Int. feriaj kursoj .. .. .	50
Int. Amikeca Ligo .. .. .	65
Mondpopola kunveno .. .. .	165
Petskribo .. .. .	131
Sankta jaro .. .. .	2
Skirenkontiĝo .. .. .	165
Somera Universitato .. .. .	118
"Reader's Digest" Pri : Hans Jakob .. .. .	28
Recenzoj .. .. .	8, 21, 37, 53, 68, 86, 103, 131, 148, 168
Rememoroj : D-rino Wanda Zamenhof .. .. .	163
Rido sanigas .. .. .	15, 170
Rusa presarto .. .. .	46
Sentencoj de Salamoniako : W.A.G. .. .. .	72
"si", Pri : M. C. Butler .. .. .	47
"siampe", Pri : M. C. Butler .. .. .	47
Signifo de la signo & : J. Régulo Pérez .. .. .	90
Spirito kaj Materio : J. S. Dinwoodie .. .. .	13
Ŝirmaj zonoj por la nova tero : R. St. Barbe Baker/M.S. .. .. .	42
Tendencoj ĉe Popolnombroj : T. L. C. Bluett .. .. .	152
U.E.A. .. .. .	16, 30, 48, 52, 60, 75, 92, 108, 124, 136, 160, 172
Venĝo, La Dubinda : S. Urban .. .. .	144
Vojaĝoj de Prof. D-ro I. Lapenna .. .. .	4, 45, 78, 96, 98
Vojaĝo per Esperanto : L. Friis .. .. .	162

"Mar  
 pensi .  
 "Ind  
 La p  
 kun la  
 suprent  
 de la k  
 La var  
 neniu  
 kvaron  
 Nun  
 okuloj  
 sangon  
 etendas  
 respon  
 majesto  
 kovrite  
 Kian v  
 Alta  
 puŝtira  
 foriras  
 ruĝajn  
 devizo  
 Lerte i  
 korto.  
 istino  
 Mi p  
 inform  
 Aziano  
 Dum  
 Gasteja  
 malsup  
 istino  
 ekveki  
 ploraĉa  
 Kie est  
 Kie  
 (Kun  
 legantoj  
 de mer  
 Zamenh  
 Majstro,  
 Anglujo  
 8. N  
 eksterl  
 precip  
 9. N  
 Pro ti  
 kapabl  
 10.  
 kunlab  
 forgest  
 sukces

## TRA LA LIBRARO

